NOVAĴOJ.
Dnes v rámci divadelního festivalu veselý taneční večer v Masarykových sadech. Vstupné není započteno ve školném. Doporučujeme k navštěvě tento podnik. Přejeme příjemnou zábavu.

EKZEMPLO POR EDZOJ !
Nia ĉefredaktoro renkontis en Doksy amflustrantan paron. Vera ekzemplo de l´amo. Nia ĉefredaktoro intencis intervjui ilin pri la beleco de la vespero kaj alirinte ilin li surpriziĝis. Geamantoj estis geedzoj el Val.Meziřičí, gelernantoj de SEL-ejo. Ege surprizita redaktoro kaŝe foriris por ke li ne interrompu aman flustradon. Edzoj! Jen l ekzemplo imitinda /sed nur kun siaj edzinoj, ne kun liaj/

VERDA STRANDO ĈE MÁCHA-LAGO.
Eĉ la sabla strando povas verdiĝi, tion pruvas amaso da esperantistoj.

LAŬLEĜA KOREKTO § 19.
Nia redakcio ricevis korekton de samideano kun verda ĉapo. Laŭ presa § 19 ni korektas. Ne estas vero, ke li dormetis en teatro inter du ĉarmaj samideaninoj, sed estas vero, ke li profunde dormis./Rim.de red.: oni ne miru ĉe lia aĝo/

NoVA SENSACIO.
Granda konkurso / nur por sinjoroj. Kiu sinjoro havas la plej vilajn krurojn ? Konkurso okazos dimanĉe la 27-an de ĉtm. en la kastelo Bezděz. Oni mezuros densecon kaj longecon de haregoj. Gajninto de la konkurso ricevos donacon. Anoncojn akceptas sinjorino Raškova.

LERTA ĜARDENISTO.
Oni rimarkis, ke ekzistas lertaj ĝardenistoj, kiuj ne nur fondas Internacian ĝardenistan fak-asocion, sed lerte kulturas flor-INOJN sur la laga strando, malgraŭ la aserto, ke sur la strando povas kreski sole kaktusoj.

NOVA MODO.
Hieraŭ ĉe Jelen oni vidis s-ron Mon-sinjoron, kie papili-kravato estis alkudrito de ĉarma "LUPETIŇO" al la ĉemizo. Ni supozas, ke tio estas nova modo, sed ni miras, kiamaniere tiu samideano demetos sian ĉemizon.

ANONCOJ.
Kvin ĉarmulinoj serĉas partnerojn por esperanta konversacio. Skribu sub signo " Bonaj spertuloj".

Mi serĉas belan,junan fraúlinon, kiu helpus al mi ĉiuvespere kompletigadi Plenan Vortaron. Proponojn kun fotografaĵoj adresu "Kuraĝulo el kurso A ".

DEMANDOJ.
En kiu jaro aperis Esperanto ?
Kiom da literoj en la esperanta alfabeto havas supersignojn?
Kiu tradukis "Hamleto" en Esperanton ?
Kio estis spesmilo ?
Kino signifas la vorto GROTO / respondu esperante /.
Kiom da korelativaj vortoj estas ?
Kio estas OOMOTO ?

ANEKDOTOJ.
La diskuto. Du sinjoroj renkontas unu la alian en la strato. La unu estis tre dika homo, la alia tre maldika. Dikulo /al maldikulo/. Rigardante vin, oni devas pensi, ke estas nuntempe granda malsat-mizero. Maldikulo: Kaj rigardante vin, oni pensas, ke vi estas la kaŭzo.

Ĉevalo kaj azeno.
Ĉevalo kaj azeno interdiskutas, kiu estas pli valora ol alia. La azeno diras: "Ĉevalo, ne estu tro fiera, via fiero estas ridinda. Vi ĉevaloj estos anstataŭigitaj baldaŭ per la aŭtomobiloj, sed azenoj ĉiam estos.

En zoologia ĝardeno. Filo: "Paĉjo, ĉu la azenoj ankaŭ edziĝas ?" Patro: " Nur azenoj".

Singardema.
Ĉu vi vidis policiston ?
Ne !
Mi dankas.- Bonvolu do doni al mi vian monujon.

Absolute.
Ĉu vi ne hontas ? Vi ja venas hejmen el la bierejo nur frumatene. Estas nun la kvara.
Se mi estus kuŝinta en la lito, nun ankaŭ estus la kvara.